

N. N. 32,
 Burĝonis rozarbedo

tradukita de Guido Holz

1. Burĝonis roz-arbedo
 el delikata sin'
 laŭ olda kant-heredo,
 Jiŝaj la origin';
 ekĝermis ĉarma flor'
 dum frosta vintro-tempo
 je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,
 mirinda roz-arbed',
 elvenis flor' benata
 laŭ diro de profet'.
 Laŭ sankta Di-ordon'
 ŝi naskis infaneton
 por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,
 amindas per parfum';
 la nokton ĝi forpelas
 per sia brila lum',
 nin helpas el mizer',
 el pek' kaj morto savas;
 Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

N. N. 32,
 Elkreskis rozbranĉeto

tradukita de Joachim Gießner

1. Elkreskis rozbranĉeto
 el rozarbust' de Di'.
 Aŭguro de profeto
 rakontis jam pri ĝi.
 Naskiĝis rozfloreto
 meze en vintra nokto
 laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
 Jesaj' prognozis ĝin -
 el sia korpo sproson
 Mari' la virgulin'.
 Laŭ dipotenca vol'
 ŝi naskis Di-infanon
 por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
 tre hele lumas ĝi.
 Obskuron la brileto
 forprenas nun de ni.
 Vi hom' kaj vera Di'
 el pekoj kaj suferoj
 estas savant' por ni.

...

N. N. 32,
 Jen ĉiamviva Rozo

tradukita de Leland Bryant Ross

Jen ĉiamviva Rozo
 laŭ vorto de profet'
 El la Jiŝaja ŝoso
 ekkreskis kun impet'.
 Ĝi venis, hela Flor',
 en frida tempo vintra
 Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
 la menciita Flor';
 Maria ĝin responsis
 el patrin-ama kor'.
 Ŝi naskis Rozon por
 klarigi Dian amon
 Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
 per sia dolĉ-arom'
 Heligas per Digloro
 la vojon de la hom'.
 Ja homo, tamen Di',
 ĝi ŝarĝojn malpezigas
 Kaj homojn savas ĝi.

...

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).*

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.